

Eŭropa Bulteno

APRILIO 2011, N° 4 (104)

NIAJ LANDAJ MOVADOJ BELGA ESPERANTO-MOVADO

La ĉi-jara Ĝenerala Kunveno de "Belga Esperanto Federacio" (BEF) okazis en Loverval la 26-an de marto 2011. Loverval situas 5 km-ojn sude de Karloreĝo (Charleroi). BEF estas la belga organizo agnoskita de UEA (ĉar UEA nur agnoskas naciajn organizojn) sed ĝi fakte estas reale senpova kaj estas nur kupolo de la tri regionaj memstaraj grupoj kiuj efektive aktivas en Belgio: FEL en nederlandlingva Flandrio, APE en franclingva Valonio, kaj EBG en dulingva Bruselo.



Se FEL, APE, kaj EBG funkcias kiel "asocioj sen profitaj celoj" (ASPC) kun leĝaj statutoj, BEF estas nun fakta asocio, kvankam ĝi ankoraŭ principe sekvas la statutojn de la epoko kiam BEF ankaŭ estis ASPC. Fakte en Belgio ne plu estas interese ekzisti kiel tutnacia organizo, ĉar nur regionaj organizoj rajtas ricevi subvenciojn: FEL de la flandra registaro, APE de la valona registaro kaj EBG de la Franclingva Komunumo. Konsiderante tion oni povas demandi ĉu BEF havas alian celon ol servi kiel nacia reprezentanto por UEA. Feliĉe ne ! Ĉar la jarkunveno de BEF estas la sola oficiala okazo por ĉiuj belgaj grupoj kune kunveni kaj interŝanĝi informojn pri iliaj propraj agadoj.

Ĉi-jare, partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de BEF 18 aktivuloj kaj 15 petis

senkulpigon. Konsiderante ke ĉiuj membroj rajtas partopreni, kaj ke ni sendis 50 paperajn kaj 140 retajn kunvokilojn, tio tamen iomete pruvas la moderan intereson de la belgaj esperantistoj por BEF. Sed la 18 ĉeestantoj tamen bone reprezentas la diversajn grupojn de la tri regionoj de Belgio kaj la intervenoj permesas bonan informadon pri la nuna stato de la esperantista movado en Belgio, kvankam kelkaj grupoj ne estis reprezentataj.

Komence de la kunveno la protokolo de la pasinta Jarkunveno en Ostendo kaj la raporto de la kasisto Eric Baert estis akceptataj post kelkaj negravaj rimarkoj.

La nova prezidanto de FEL Marc Cuffez kaj la prezidantino de BEF Flory Witdoeckt, informis pri la nunaj agadoj en Flandrio, precipe por la grupoj de Ostendo, de Gento kaj de Antverpeno. La plej grava agado estas ke FEL decidis organizi tradukadon por la lernado de Esperanto kadre de la projekto "Springboardtolanguage", kiu estas konsultebla sur la reto. Ili esperas ricevi oficialan subtenon de la flandra registaro. FEL regule eldonas sian paperan revuon "Horizontaal" kaj sian retan revuon "Vertikale" por la aktivuloj.



Nome de la nova estraro de APE Jean-Pol Sparenberg parolis pri la nuna revigligo de la valona asocio kaj pri la renoviga eldonado de la grupa revuo "Esperanto en Marche". Valère Doumont informis pri la venonta printempa kunveno en Mozet (PeKo).

Nome de la brusela Grupo EBG la prezidanto Angelos Tsirimokos informis pri la kunvenoj kaj prelegoj en Bruselo substrekante ke la grupo organizas kursojn je du niveloj. La redaktoro Paulo Branco prezentis la belaspektan revuon "Aktuala" kiu estas libere elŝutebla je la retadreso "<http://sites.google.com/site/ebgaktuala/>".

Nome de la fervojistoj (BEFA) Lucien De Sutter klarigis la nunajn malfacilaĵojn de BEFA : Pro la fakto ke pli ol la duono de la kunvenaj ĉeestantoj ne plu estas fervojistoj, la fervojistaj instancoj (SNCB-NMBS) ne plu volas doni subvencion kaj pro tio, tiu grupo petas nun monhelpon de BEF por aĉeti instrumaterialojn. BEF

konsentis donacon de 200 eŭroj, ĉar efektive la plej grava rolo de la kaso de BEF estas helpi la helpopetantajn grupojn, ĉar BEF ne plu havas proprajn agadojn.

Por ILEI Marc Cuffez rimarkigis ke ekzistas membroj nur en Flandrio. Necesus ankaŭ varbi instruistojn en Valonio kaj en Bruselo.

Pri la rilatoj de BEF kun UEA kaj EEU informis Flory. Ŝi substrekiis la gravajn agadojn de la estraro de EEU, kaj la bonajn rezultojn, kadre de la instancoj de Eŭropa Unio (EU). Ŝi ankaŭ informis pri siaj personaj agadoj en Afriko, precipe en Kongolando.

Fine de la kunveno, la asembleo unuanime aprobis la agadon de la estraro kaj konsentis ke ĝi senŝanĝe pluestras.

Claude Glady

EEU: LA PLEJ GRAVA ATINGO ĜIS NUN, kaj poste...

Seán Ó Riain



“Esplori la lernfaciligajn ecojn de pluraj lingvoj por ekscii kiu dua lingvo plej verŝajne kuraĝigos la postan lingvolernadon. Noviga brita programo estas testanta alternativan lernfaciligan aliron ekde septembro 2006 (sekcioj 4.2 kaj 6.4.1), kaj tio povos havi implicojn por la ordo en kiu oni lernos lingvojn.”

(EU kaj naciaj niveloj, kaj projektoj de anoj de la Platformo; rolo de la Platformo por esplori kaj dissendi la plej bonan praktikon en ĉi-tiu kampo)

Rekomendoj de la EU Civitansocia Platformo pri Multlingveco (29 tuteŭropaj organizaĵoj), fina raporto, 30 Marto 2011

Kiel ni raportis pasintmonate, EEU atingis tre gravan sukceson fine de marto 2011.

Iun rolon por Esperanto – tute modestan, kiel lernfaciligado en la servo de eŭropa multlingveco – akceptis 29 tuteŭropaj organizaĵoj, kaj 28 el ili estas ne-esperantistaj. Legantoj tuj rimarkos ke la vorto “Esperanto” ne estas tuj menciita, sed kiam oni legas la sekciojn 4.2 kaj 6.4.1 de la pli longa raporto, oni trovos detalojn pri la noviga brita programo, “Springboard to Languages” (www.springboard2languages.org). La ‘lernfaciliga’ rekomendo estas la dua en la sekcio pri edukado kaj troviĝas en la 6-paĝa ‘administra resumo’ de la raporto.

Somere de 2009 estis decido ke EEU plenumas la diversajn kondiĉojn por esti akceptita fare de Eŭropa Komisiono por partopreni la laboron de la nova "Eŭropa Civitansocia Platformo pri Multlingveco", kiu eklaboris en Bruselo la 1-an de oktobro 2009. La 30-an de marto 2011 okazis la lasta kunsido por finpretigi la raporton, menditan de Eŭropa Komisiono. La kunveno akceptis la finan raporton, kiu entenas ĉiujn proponojn kaj kontribuojn de EEU. La Platformo ellaboris longan 200-paĝan dokumenton kiu traktas 4 kampojn: lingvoplanado, multlingveco kaj socia inkluziveco, edukado kaj tradukado. La mallongigitaj 6-paĝa 'administrativa resumo' kaj 30-paĝa raporto estos verŝajne la plej ofte legataj partoj de la dokumento, kaj ili estos publikigitaj kune kun la longa versio en la retejo de Eŭropa Komisiono kaj prezentataj al la membroŝtatoj.

Tiu venko povos grave malfermi pordojn por Esperanto. Kiel sciante, la nuna dua lingvo en ĉiuj EU-landoj (krom la anglalingvaj) estas la angla. Sed tia ĝi estas, ne pro pedagogiaj kialoj, sed multe pli pro politikaj kialoj: multaj gepatroj, kiuj ne bone komprenas la riĉecon de multlingveco kaj la gravecon gardi la propran lingvon, emas puŝi por ke la angla estu la unua fremdlingvo lernata ĉie. Ekzemple, la 13-an de aprilo la germana radio raportis ke Ĉeĥio intencas forigi la nunan liberecon elekti inter la germana kaj la angla lingvo kiel unua studota fremdlingvo en ĉeĥaj lernejoj, kaj devigi ĉiujn studi nur la anglan kiel unuan fremdlingvon. Stranga decido, kiam oni konscias ke 10 milionoj da ĉeĥoj vivas apud 100 milionoj da germanlingvanoj, kun kiuj ili havas la plej grandan parton de sia komerco. En multaj kazoj la angla kiel unua fremdlingvo tute ne favoras la studadon de alia fremdlingvo. Unue, ĉar la angla estas tiom domina internacie ke homoj pensas ke ĝi sufiĉas, kaj ke ne necesas studi aliajn fremdlingvojn krom ĝi. Due, ĉar la angla havas tiom enorman vortaron, tiom da neregulaj gramatikaj ecoj, kaj tiom da lokutismoj ke la lernado neniam finiĝas. Se la raporto de la Platformo sukcesos vekti iomete da intereso en pluraj landoj pri la lernfaciligaj ecoj de Esperanto, multege pli da homoj aŭdos pri ĝi, kaj en pozitiva kunteksto, kiel helpilo de lingvolernado.

Dum la laboro ekde 2009 rimarkiĝis iom-post-ioma ŝanĝo en la sinteno de la 28 aliaj organizaĵoj al Esperanto. Unue estas nescio kaj eble suspekto ke EEU celas trovi vojon por nerealisme trudi Esperanton al EU. Sed post intensa laboro por kune verki detalan 200-paĝan raporton, ni rimarkas kreskantan respekton por la realisma sinteno de EEU, kaj por la fakto ke ni trovis praktikan kaj realigeblan rolon por Esperanto en la antaŭenigo de lingvolernado en EU. Aparte efika estis la laboro en la Laborgrupo pri Edukado, sub la prezidanteco de Cor van der Meer de la Fryske Akademy/Mercator, Leeuwarden/Ljouwert, Nederlando. Li estas vivlonga batalanto por sia denaksa lingvo, la frisa, la plej granda autoktona malplimulta lingvo en Nederlando (kun proksimume 350.000 parolantoj). Kvankam ne-esperantisto, li estas malfermita homo, kaj povis akcepti limigitan rolon por Esperanto kiel lernfaciligado kadre de eŭropa politiko pri multlingveco. EEU submetis multajn aliajn kontribuojn al la Platformo, kaj ŝlosile influis preskaŭ ĉiujn gravajn partojn de la raporto. Estus tro longe doni detalojn nun (temas pri multaj detalaj kontribuoj al ĉiuj 4 laborgrupoj de la Platformo). Pro tio pli taŭgas koncentriĝi pri la plej grava atingo kaj progresigi ĝin en niaj EU-landoj.

Mi ŝatus elkore danki al ĉiuj membroj de la landaj asocioj de UEA en la 27 EU-landoj, kiuj multe helpis nin atingi tiun rezulton. Dankegon al Angela Tellier de la programo 'Springboard' pro ŝiaj konstantaj helpo kaj konsiloj, kaj ŝiaj tujaj kaj detalaj respondoj al ĉiuj petoj. Kaj dankegon al la tuta estraro de EEU pro konstanta subteno, kaj aparte al miaj du kolegoj kiuj reprezentis EEU kun mi en la Platformo,

Maja Tiŝljara kaj Jozef Reinvar. Ili ĉeestis kaj valore kontribuis dum ĉiuj kunvenoj de la Platformo dum la lastaj jaro kaj duono.

Estonto – civitana iniciato kadre de EU

Kiel ni daŭrigos la laboron? Unue, kun la 28 ne-esperantaj organizaĵoj en la supremenciita projekto "Poliglotti4.eu". Due, ni faru ion, kio altigos la konscion pri Esperanto ĉe averaĝa civitano, sed sen ĝeni ŝin/lin. Ekzemple, la nova 'civitana iniciato' de EU, kiu ekde la 1-a de aprilo 2012 ebligas al 1 milionoj da EU-civitanoj per siaj subskriboj fari proponon pri kiu devos okupiĝi Eŭropa Komisiono, kondiĉe ke la propono troviĝos ene de ĝiaj kompetencoj. Ni estu klaraj ke la Komisiono ne devos akcepti la proponon, eĉ se 1 miliono subskribos ĝin, sed en tiu kazo la Komisiono estos devigata publikigi la kialojn kial ĝi ne akceptis la proponon. Jam ekis diskuto ene de EEU kaj la landaj asocioj de UEA en EU-landoj pri propono kiu estus la plej taŭga. Estus bone se EEU povus decidi pri propono ĝis la kunveno dum la UK en Kopenhago, ĉar tio donus al ni tempon organizi la tutan kampanjon – ni memoru ke temas pri arigado de 1 miliono da subskriboj en almenaŭ 7 EU ŝtatoj ene de 12 monatoj ekde aprilo 2012. Por fari tian decidon, ŝajnas al mi ke ni devus sekvi kelkajn klarajn kriteriojn, lerninte lecionojn de nia sperto kiel partoprenanto de la Platformo.

1. La propono estu ene de la kompetenco de Eŭropa Komisiono.
2. Ĝi rilatu al eŭropa integriĝo. Fakte ĝi devas "inviti la Komisionon, ene de la kadro de ĝiaj povoj, submeti iun ajn taŭgan proponon pri aferoj kie civitanoj konsideras ke leĝa akto de la Unio estas bezonata cele al efektivigo de la Traktatoj" (laŭ artikolo 2 de la oficiala teksto de la regulo.[1](#))
3. Ĝi konsciigu pri Esperanto laŭeble multajn civitanojn, sed sen ĝeni ŝin/lin. Do, civitanoj povu subskribi libere sen devontigi sin al iu konkreta agado.
4. Ĝi antaŭenigu Esperanton, sed nerekte kaj iom flankefike, t.e. ĝi havu alian kernan celon, kiu interesigos civitanojn nelingvemajn.
5. Ĝi havu ŝancon arigi 1 milionon da subskriboj ene de 1 jaro en almenaŭ 7 ŝtatoj de EU.

Unu afero kiu eble povus plenumi tiujn kondiĉojn estas la Eŭropa Himno kiun kantas EEU, laŭ la teksto de la antaŭa grandmerita prezidanto de EEU, Umberto Broccatelli (vidu <http://www.europo.eu/eo/europa-himno>). Dank'al la malavara kaj sindona laboro de multaj Esperantistoj ni jam havas tradukojn de la himno al 38 lingvoj – do al ĉiuj 23 oficialaj lingvoj de EU, al multaj malplimultaj lingvoj ene de EU (kataluna, eŭska, kimra, bretona, skot-gaela, frisa, ktp.), kaj al aliaj grandaj mondaj lingvoj (ĉina, japana, indonezia, hinda ktp.). Kompreneble EEU estas malferma al aliaj proponoj, kaj antaŭĝojas la diskuton pri tiu grava ebleco por Esperanto.

GRAVA PROPONO AL EŬROPA PARLAMENTO

La brita deputito Andrew Duff estas la prezidanto de la Federista Intergrupo ĉe Eŭropa Parlamento. Al la ĵurnalistoj li deklaris ke "temas pri grava paŝo por la demokratio de Eŭropunio".

Lia propono estis aprobita kadre de la Komisiono: Konstituciaj Aferoj de EP.

La propono i.a. antaŭvidas - ekde la venontaj balotoj en 2014 - la elekton de 25 kandidatoj, krom la nunaj 751, en ununura tuteŭropa elektodistrikto elinter transnacia listo redaktita de la politikaj EU-partioj. Tiuj listoj devos enhavi kandidatojn el almenaŭ unu triono de la membroŝtatoj. Ĉiu elektanto povos voĉdoni por 2 kandidatoj: unu el la nacia aŭ regiona listo kaj unu el la transnacia listo.

Tio signifas ke ekde 2014 (se en junio la propono estos aprobita de EP)

- la EU-civitanoj povos voĉdoni por aŭtentikaj eŭropuniaj kandidatoj,
- la komunaj transnaciaj listoj transformos la nunajn landajn partiojn en aŭtentikajn EU-partiojn,
- la 25 kandidatoj de la transnaciaj listoj estos gravaj eŭropaj pintuloj, ege konataj en la tuta Unio.

Por detale legi en ĉiuj oficialaj lingvo de la Unio bv. malfermi la paĝon de EP

<http://www.europarl.europa.eu/en/headlines/content/20110415STO17908/html/A-big-step-forward-for-a-United-European-Democracy>

J-K Rinaldo el Padova

TORINO 2011 - ITALA ESPERANTO-KONGRESO



Eŭropa subteno al la itala kongreso - Aliĝo al la seminario "Kaj nun ni estu eŭropanoj"

La Seminario Kaj nun ni estu Eŭropanoj, kiu estos la ĉefa programero de la venonta kongreso de Itala Esperanto-Federacio (Torino, de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2011) estas agnoskita de Eŭropa Unio kiel evento de programo Grundtvig por vivdaŭra lernado; por detalaj informoj aliru la kongresan retejon :<http://italakongreso.esperantoitalia.it/>> <http://italakongreso.esperantoitalia.it/>).

20 ne-italaj kongresanoj ricevos helpon de Eŭropa Unio por partopreno; 8 italaj kongresanoj povos ankaŭ partopreni, kaj ricevos la koncernan dokumentaron. Tiucele aliru retpaĝon, indiku, ke vi intencas partopreni la seminarion, kaj sekve respondu la demandaron kiu aperas post tiu indiko. Bonvolu tion fari antaŭ la fino de marto; La kandidatiĝojn juĝos komisiono, gvidota de prof. Fabrizio Pennacchietti, kiu elektos 20 kongresanojn por la Eŭropa subvencio.

Renato Corsetti

Internacia Esperanto-Tago

Esperanto 'Twitter' Tago okazos je la 26a de julio, la datreveno de la lanĉigo de la Unua Libro. Ni esperas ke vi povos partopreni – se jes bonvole pepu je tiu tago, kaj marku per #Esperanto.

La celo estas antaŭenigi Esperanton reklamcele.

Detaloj jenas ĉi-tie <http://www.facebook.com/event.php?eid=207181359294030>

Espereble iuj en Hispanio povos partopreni . Bonvole ankaŭ informu viajn alilandajn amikojn !

Brian Barker

GRANDIOZA LABORO DE SINJORO GADOS LA UNUA HUNGARA PREZIDANTECO EN LA EŬROPA UNIO 2011 NOVAĴOJ KAJ EVENTOJ



Ĝis la fino de junio 2011. Hungario plenumas la prezidantecan rolon de la Eŭropa Unio.

Ni ŝatus ĉiam denove atentigi Vin pri la grandega kaj grandioza por-esperanta laboro de s-ro László Gados, kiu pretigas tre valoran, esperantlingvan retejon pri la eventoj de la hungara prezidanteco de EU.

Bonvolu ĉiutage klaki al <http://www.vilagnyelv.tripod.com/Prezid.htm> kaj nepre informu pri ĝi ankaŭ Viajn geamikojn.

Jam funkcias ankaŭ la retejo de la pola prezidanteco : <http://www.facebook.com/PolskaPrezydencja2011>

Ankaŭ ĉi tie ni planas vastan por-esperantan agadon ekde julio. Kompreneble, oni povas jam nun aliĝi.

Ludoviko Molnar

DU ARANĜOJ DE GEA

GEA invitas vin al :

1) Komuna Nederlanda kaj Germana Esperanto-Kongreso je 2011-06-10/13 en Münster/Vestfalujo

<http://www.esperanto.de/gea/GEK2011.html>



kaj al

2) Migrotagoj ĉe Rejno je 2011-10-02/07 kun restado en bona hotelo

<http://www.esperanto.de/gea/ema2011.html>

Bonvenon!

Rudolf Fischer, GEA-prezidanto

UNUA KINO-FESTIVALO EN ESPERANTO

Krea unuiĝo "Filmoj sen limoj" kun subteno de TEJO ĝojas prezenti al vi freŝan unikan kulturen eventon.

Temas pri la unua Esperanta kinofestivalo, kiu okazos de la 10-a ĝis la 13-a de julio 2011 en San-Paŭlo, Brazilo dum TAKE.

La oficiala retejo de kinofestivalo estas <http://kinofestivalo.org>.

La Kinofestivalo konsistos el du programoj: konkursa kaj nekonkursa.

Ĉiu ajn povas partopreni la konkurstan programon kaj gajni premion: unu el 5 iPod Touch 4gen. La informa filmeto pri konkurso: <http://vimeo.com/21927597>

La nekonkursan programon partoprenos filmoj, kiuj estas ligitaj kun Esperanto kaj ankaŭ premiitaj filmoj kun voĉtraduko kaj subtekstoj el la internacia lingvo.

Partoprenu la konkurson, rakontu pri ĝi al viaj amikoj, kunlernantoj, esperantistoj kaj ĝuu la filmojn.

Aleksander Osincev

Kreanto de Verda Filmejo,
direktoro de Esperanta Kinofestivalo

70-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO



70-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos en San Lorenzo de El Escorial de la 28-a de junio ĝis la 3-a de julio, organizata de Madrida Esperanto-Liceo kaj Hispana Esperanto-Federacio. La kongreso okazos en Kulturdomo de San Lorenzo, situanta en Unua Domo de Metioj, historia konstruaĵo projektita de Juan de Herrera samstile kiel la Monaĥejo kaj tre proksima al ĝi.

Krom ekskursoj, prelegoj kaj koncertoj, okazos oficialaj ekzamenoj de Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro. Estos bonega okazo por akiri oficialan diplomon de Esperanto.

Baldaŭ finiĝos la unua periodo por aliĝo kun rabatita kotizo. Por aliĝi kaj havi plian informon: www.esperanto.es/kongreso.

Juan Trenado

SOMERA ESPERANTO-STUDADO



SES okazos ĉi-jare de la 30-a de julio ĝis 7-a de aŭgusto 2011 en Nitra, Slovakio. Ni daŭre havas sufiĉajn liberajn lokojn (ĉi-jare la ejo kapablas akcepti pli ol 300 homojn) kaj do ŝatus peti vin, helpi ilin plenigi. Ni bezonus iom reklami la aranĝon ankoraŭ. Ĝis la fino de aprilo estas lasta pli malkosta aliĝ-periodo.

Ĉu vi povus helpi al ni? Sufiĉus ekz. informi pri la aranĝo en via klubo, asocio, amikaro, retejo, facebook-profilo, ipernity paĝo ktp.

Same eblas helpi reklami la aranĝon per la ligbutonoj – tiujn pri SES vi trovos tute sube en la paĝo: http://eo.lernu.net/pri_lernu/informiloj/ligbutonoj.php

Mi esperas ke almenaŭ kun kelkaj el vi mi renkontiĝos ankaŭ dum SES 2011.

PS: planata estas ankaŭ "karavano" de UK al SES, same de SES iros karavano al FESTO en Francio (kaze ke kelkaj homoj volus kombini plurajn aranĝojn)

Petro BALAŽ

SINDIKATOJ EN HISPANIO UZAS ESPERANTON

De antaŭ ne longe la sindikato "Cordinació Sindical Obrera" (C.O.S.) de la Katalunaj Landaroj uzas esperantan lingvon en sia agado, ekz.en sia ĵurnalo, kiam temas pri internaciaj novaĵoj. Vidu:

http://www.sindicatcos.cat/index.php?option=com_content&view=article&id=359:comunicat-en-suport-de-sidi-ahmed-eddia-i-mohammed-hallab&catid=41:comunicats&Itemid=75

Iuj (ne ĉiuj) sindikatoj revas pri pli bona estonta mondo, kie la homoj parolas en neŭtrala lingvo.

Se vi konas sindikatojn kiuj jam uzas E-on, aŭ pri tio interesiĝas, bonvolu sciigi pri tio. Temas pri maniero faciligi kontaktojn inter ili.

Ankaŭ la hispana CGT uzas E-on, vidu: <http://www.rojoynegro.info/cultura-libre/esperanto>

Guillem Bedeval

EŬROPA JUNULARO SENTAS APARTENON AL EU

Jen la rezultoj de brita sondado de "European Policy Center" kaj de "City University London"

pri la sento je aparteno al EU de la eŭropunia junularo (inter 15 kaj 30 jaraĝaj).

- pli ol 80%: Finnlando
- 70-80%: Danlando, Okcidenta Germanio, Svedio, Belgio
- 60-70%: Kipro, Francio, Aŭstrio, Luksemburgio, Grekio, Orienta Germanio, Nederlando, Portugalio, Italio, Slovenio
- 58% EŬROPUNIA MEZUMO
- 50-60%: Ĉeĥio, Estonio, Hispanio, Pollando, Hungario, Slovakio, Irlando, Latvio
- 40-50% neniu lando
- 30-40%: Litovio, Britio, Bulgario, Norda Irlando, Rumanio, Malto

Atentinda afero estas la distingigo inter Okcidenta kaj Orienta Germanio, inter Irlando, kaj Norda Irlando.

Nu, kvankam de kelkaj jaroj la politika klaso diskutas pri la sento kaj la valoro je aparteno al EU, la junularo liveras tre signifan respondon.

La generacio de la plej junaj, kiu ricevis sian unuan salajreton en eŭroj, kiu facile moviĝas tra la internaj limoj, kiu partoprenas la Erasmus-staĝojn, kiu ne plu estas devigata al militservo, kiu naskiĝis en pacigita Eŭropunio, kie jam falis la Berlina muro, tute ne partoprenas polemikojn pri la unuiga proceso. Ja temas pri la estonto kiu antaŭiras preterlasante la naciismajn sintenojn ankoraŭ ĉeestantajn en la eŭropaj pliaĝuloj.

Kaj eĉ pli signifaj estas jenaj temaj rezultoj inter la eŭropunia junularo:

- 90% de la junularo asocias al EU la koncepton je libero vojaĝi, lerni kaj labori eksterlande;
- 72% konsideras EU protektilo de iliaj civitanaj rajtoj;
- 71% konsideras EU ilo por plibonigi sian ekonomian situacion;
- 44% favoras EU-rolon en sanaferoj kaj sociaj politikoj.

Rilate al ilia estonto ili konsideras grava

- 62% bonan instruadon;
- 26% konon de influaj personoj;
- 7% la riĉecon de la familio.

Nu junularo kun pli pragmata vido kaj malpli idealisma ol tiu de ĝiaj fondintaj "avoj".

Por la EU-junularo:

- * eŭro estas nerezignebla,
- * la polemikoj pri la unuiga proceso estas marĝenaj aferoj,
- * ne estas la sento je fremdeco en kiu ajn EU-lando.

Sume la EU-junularo konstituas socian blokon konsiderinde homogenan en ĉiuj EU-landoj, malpli influita ol antaŭvidite de limoj kaj originaj kulturoj kaj pli nete distingita ol antaŭvidite de la landa plenkreska socia bloko. Krome tiu homegeneco de la junularo fariĝas pli forta inter la instruita junularo.

Rilate al junularo de la 12 landoj, kiuj aldoniĝis al EU post 2004, eblas konstati ke ĝi favoras al ŝtato pli "malpeza" kun malpli da naciaj intervenoj pri sanaferoj, pensioj kaj bonstato.

Sume sinteno kiu antaŭsentigas en la estonto konsistan kreskon de la Eŭropunia

rolo.

El artikolo de itala ĵurnalo "La Repubblica".
Tradukis kaj adaptigis

J-K Rinaldo de Padova

Eŭropa Bulteno. 2011. № 4 (104) Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: 2011-04-29

Redaktoro: *Zlatko Tišljar*

Kunlaborantoj: *Claude Glady, Seán Ó Riain, J-K Rinaldo el Padova, Renato Corsetti, Brian Barker, Ludoviko Molnar, Rudolf Fischer, Aleksander Osincev, Juan Trenado, Petro BALAŽ, Guillem Bedeval*

Teknika redaktoro: *Raymond Gerard*

Leterojn kaj komentojn sendu al EEU:

Rete: ztisljar@gmail.com

<http://www.gazetejo.org>

Enhavo:

- [NIAJ LANDAJ MOVADOJ - BELGA ESPERANTO-MOVADO](#)
- [EEU: LA PLEJ GRAVA ATINGO ĜIS NUN, kaj poste...](#)
- [GRAVA PROPONO AL EŬROPA PARLAMENTO](#)
- [TORINO 2011 - ITALA ESPERANTO-KONGRESO](#)
- [Internacia Esperanto-Tago](#)
- [LA UNUA HUNGARA PREZIDANTECO EN LA EŬROPA UNIO 2011 - NOVAĴOJ KAJ EVENTOJ](#)
- [DU ARANĜOJ DE GEA](#)
- [UNUA KINO-FESTIVALO EN ESPERANTO](#)
- [70-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO](#)
- [SOMERA ESPERANTO-STUDADO](#)
- [SINDIKATOJ EN HISPANIO UZAS ESPERANTON](#)
- [EŬROPA JUNULARO SENTAS APARTENON AL EU](#)

Ligiloj:

- http://eo.lernu.net/pri_lernu/informiloj/ligbutonoj.php : lernu!: About lernu! / Informational literature / Link buttons
- <http://italakongreso.esperantoitalia.it/> : 78a Kongreso de Esperanto - Torino 2011
- <http://kinofestivalo.org/> : Kino sen limoj — Internacia sendependa kinofestivalo en internacia lingvo Esperanto
- <http://sites.google.com/site/ebgaktuala/> : Aktuala
- <http://vimeo.com/21927597> : Kinofestivalo HD on Vimeo
- <http://www.esperanto.de/gea/GEK2011.html> : Nederlanda-Germana Esperanto-Kongreso 2011
- <http://www.esperanto.de/gea/ema2011.html> : Esperantista Migrado Autuna
- <http://www.esperanto.es/kongreso> : Kongreso en San Lorenzo
- <http://www.europarl.europa.eu/en/headlines/content/20110415STO17908/html/A-big-step-forward-for-a-United-European-Democracy> : "A big step forward for a United European Democracy": Duff on electoral reform
- <http://www.europo.eu/eo/europa-himno> : EUROPA Himno
- <http://www.facebook.com/PolskaPrezydencja2011> : Polska Prezydencja 2011 | Facebook
- <http://www.facebook.com/event.php?eid=207181359294030> : Tutmonda Twitter Agado por Esperanto! | Facebook
- <http://www.facebook.com/pages/Tutmonda-Twitter-Agado-por-Esperanto/196861870344972?sk=wall#%21/event.php?eid=207181359294030> : Tutmonda Twitter Agado por Esperanto! | Facebook
- <http://www.rojoynegro.info/cultura-libre/esperanto> : Esperanto | Rojo y Negro
- http://www.sindicatcos.cat/index.php?option=com_content&view=article&id=359:comunicat-en-suport-de-sidi-ahmed-eddia-i-mohammed-hallab&catid=41:comunicats&Itemid=75 : Comunicat en suport de Sidi Ahmed Eddia i Mohammed Hallab
- <http://www.springboard2languages.org/> : Springboard... to Languages
- <http://www.vilagnyelv.tripod.com/Prezid.htm> : LA UNUA HUNGARA PREZIDANTECO EN LA EŬROPA UNIO 2011

- <http://www.youtube.com/watch?v=rBX-jAa5VYI> : YouTube - Dr. Zamenhof's Illustrated Biography - By John Hornby and Colin Andrew